

PREZO: 1:- Kr.

Stellan Engholm

9688

MALGRANDA REVUO

Nro 3 · 1949

7a JARO

ENHAVO:

	Paĝo
Neŭtraleco aŭ objektiveco? de Stellan Engholm.....	1
Germana letero	5
Revdemandoj, de Günther Bammert	10
Urba infano, de William Auld.....	11
Pri la mortpuno, de Josef Sommer	12
Meditoj de nespiritisto pri spiritismo, de C. Joon...	17
Kio estas metapsikio? de K. Wilgenhof	20
Kiel kreskigi la legemon? de Einar Hult	27
Literaturo	29

Redaktoro — Eldonanto:

STELLAN ENGHOLM, HAGGE, SVEDUJO

MALGRANDA REVUO

aperas kvaronjare. Prezo 1 kr. (inkl. sendkoston). Jarabono 4 kr. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 3 rpk. — S. Engholm, Box 205, Hagge, Svedujo. Poŝta ĝirokonto 26 80 23. MR ne aperigas anoncojn aŭ informojn.

Perantoj

- Aŭstrio: Eldonejo "Tramondo", Neutorgasse 9, Wien I.
Belgujo: Flandra Esperanto-Instituto, P. van Humbeekstr. 3, Brusel W.
Brazilo: Sro Jozefo Joels, Caixa Postal 2 — Lapa, Rio de Janeiro.
Britujo: Libroservo de UEA, Heronsgate, Rickmansworth (Herts).
Ĉeĥoslovakio: Esperanto-Asocio en CSR, Uralské nám. 9, Praha.
Danujo: Libroservo de CDEL, Pr. Jørgensgade 4 A, Kopenhago N.
Finnlando: Eldono Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki KE.
Francujo: Unuiĝo Esperantista de Francujo, 34 rue de Chabrol, Paris X.
Germanujo: Ing. Hellmut Otto, Bamihlstr. 7, Berlin-Spandau.
„ Sro Oscar Bünemann, Isestr. 79 III, (21) Hamburg 13.
Italujo: Sro Leo Costantini, Piazza Lagosta 2, Milano.
Nederlando: Libroservo FLE, Roelantstr. 4, Amsterdam W.
Palestino: Sro J. Kohen-Cedek, P. O. B. 7015, Jerusalem.
Polujo: R. Sakowicz, Parafialna 3, Nova Sól.
Svisujo: Sro O. Walder, Elgenheim, Romanshorn.
Usono: Libroservo de American Esperantist, 114 W. 16 St. New York 11.

MALGRANDA REVUO

Nro 3

7a JARO

1949

Neŭtraleco aŭ objektiveco?

De STELLAN ENGHOLM

Mia artikolo "Vortoj kaj realo" en la pasinta numero venigis al mi rimarkigojn de du personoj. Unu letero venis el Germanujo. Mi supozas, ke ĝi povas interesi iujn legantojn de MR, kaj tial mi donis lokon al la tuta letero (vidu "Germana letero"). La rimarkigo koncernis unualoke la frazon: "La detruo kaj la suferoj ĉe la viktimoj de la germanoj kaj ĉe la germanoj sufiĉas kiel ekzemplo." (Nro 2/49, p. 10 l. 3—2 de mals.)

La esprimo "la germanoj" kompreneble ne estas tute ekzakta vortigo de mia penso, sed mi estas konvinkita, ke neniu leganto supozis, ke mi per ĝi volis diri, ke ĉiuj germanaj individuoj estas respondaj pri la milito kaj kruelaĵoj faritaj de certaj germanoj. Sed eble mi esprimis min iom neklare ankaŭ en alia detalo. Per la esprimo "ĉe la germanoj" mi volis diri, ke ankaŭ la germanoj fariĝis viktimoj de detruo kaj sufero, ankaŭ senkulpaj germanoj kaj ankaŭ pro malŝato kaj malamo, kiujn ili ne meritis. La antaŭa frazo pri "sentoj . . . kreskigitaj ĝis fanatikeco kaj eksploda katastrofo" validas ĝenerale, kaj kiam mi poste uzis "la germanojn" kiel ekzemplon, mi pensis ne pri ĉiuj individuoj, nur pri tiuj, antaŭ ĉio pri la gvidantoj kaj iliaj subtenantoj, kiuj nerefuteble estis regataj de fanatikeco.

La dua rimarkigo venis el Britujo. Tiu samideano trovas en la artikolo de Örne la kontraŭdiron kontraŭ miaj principoj.

Li skribas: "Ekzemple kie estas la fakta bazo de la politikaj asertoj de Anders Örne (en lia cetero tre pensiga artikolo), ke 'Sovetunio . . . klopodas por efektiviĝi la solpotencon en Ĉinujo'? El la raportoj pri la ĉina interna milito oni povas

abunde konstati, ke la plej granda klopodado de ekstera enmiksiĝo venis de Usono, kiu ŝutis dolar milionojn por la armado de Ĉiang Kaj Ŝek inkluzive la liveron de tutaj aviadilflotoj, dum ŝajnas, ke la kontraŭa partio ne havis eĉ unu aviadilon. Tion mi scias el raportoj en ordinaraj, liberalaj gazetoj; certe ankaŭ en via lando oni raportis tion.

Ankaŭ la antaŭiranta hipotezo de sro Ōrne pri "diktatoreca Ĉinujo kulmine armita" mi trovas tendenca kaj malica. Tiuj du makuloj difektas la cetero bonan artikolon, kaj mi bedaŭras, ke vi ne eltrancis ilin, ĉar por mi ili venenas la artikolon tute. — — — Nun certe vi pensas ĝenite, ke mi enkondukas nekonvene politikon en diskuton pri via kultura revuo. Tamen atentu, ke ĝuste vi (ne mi) alportis la politikon en la aferon.

Mi mem por la politiko havas nenian talenton kaj mi preferas neniam tuŝas ĝin. Mi preferas kiom eble izoli min de ĝi — sed estas tre malfacile tion fari. Eĉ vi mem (kiel mi montris) ne evitis tion, ĉar tre facile, se oni volas eviti politikon, oni pasive akceptas la politikon de la roganta tendenco." —

Mi respondis letere al li, ke mi ne trovas la eldirojn de Ōrne politiktendencaj, ke Ōrne, kvankam socialdemokrato, parlamentano kaj jama socialdemokrata ministro, esence estas nepolitika homo, ke mi kun scio dum preskaŭ 30 jaroj pri liaj libroj kaj paroladoj, povas garanti, ke li ne skribis la cititajn liniojn tendence. Al la legantoj mi nun donu la saman informon kiel al la angla samideano, nome ke la frazo "Se diktatoreca Ĉinujo . . ." eble ne estas kontentige bone tradukita. Ĝi estas laŭvorte tradukita, kaj la manko de artikolo indikas, ke temas pri estonte eventuale diktatoreca Ĉinujo . . . La tuta frazo estas supozata, kaj laŭ mia kompreno ĝi rajte (kaj ne farante politikan propagandon) havas lokon en la rezonado pri la nombrokresko de la homoj.

Pri tio ke "Sovetio . . . klopodas por efektiviĝi" mi respondis, ke Ōrne neniam asertas ion, kio ne estas bazita sur faktoj, kaj certe ankaŭ tiu aserto estas bazita sur faktoj. La vorto solpotenca signifas solpartia, svede: totalitār. Mi mem, tion mi nun aldonas, ne povus fari tiun aserton pri la ev. klopodado de Sovetunio, ĉar mi efektive ne atentis pri tiu afero,

legis tre malmulte pri ĝi kaj ne povas laŭ fidindaj fontoj aserti, ke Sovetio klopodas, nek ke ĝi ne klopodas.

Al miaj rimarkigoj li en dua letero respondis:

"Via klarigo pri la nepolitikemo de Ōrne nur ilustras kion mi jam diris: volante esti politike neŭtrala oni nur alprenas la sintenon de la ortodoksa opinio. Kiu, naĝante en fluo, ne volas kontraŭnaĝi, tiu vole nevole kunfluas. Mi petas vin, imagu nur, ke la hipotezo pri Ĉinujo Ōrne estus farinta pri Usono: tiam, eĉ kvankam la supozo estus multe pli persvade fundamentita per la faktoj, do multe pli normala kaj verŝajna — la diro tuj ŝajnus politiktendenca kaj polemika. Sed se oni nur batas la hundon, kiun la aliaj batas, neniu (neniu, ĉu ne, pasiva kapo) trovas en tio ian maljuston aŭ eĉ ion "politikecan". La samo rilatas al la aserto pri Sovetio: ĉar Ōrne jam konkludis, ke Sovetio volas eĉ apogi la komunismon, sckve (sen iaj atestoj) ĝi apogas ĝin en Ĉinujo. (Tamen en Jugoslavio?) Sed pri la okulfrapa, monstra kaj krimega ŝutado de armiloj en Ĉinujon fare de Usono Ōrne silentas, ĉar (ĉu ne) li volas esti . . . politike neŭtrala!" —

Mi prezentis al vi ĉion supran pro du kaŭzoj. La unua estas, ke ĉiu leganto de MR rajtas kritiki kaj ĝustigi ĉion, kion li trovas crara aŭ falsa. Nur per komuna serĉado kaj interkorektado ni povas iom post iom akiri pli veran kaj vastan komprenon. Efektive mi intencis, ke MR grandparte estu forumo por vivanta debato. Tio preskaŭ neniom plenumiĝis, sed kiam iom da debatemo montriĝas, mi ĝoje utiligas ĝin.

Due, kaj tio estas en tiu ĉi afero la plej grava, mi deziras fari jenan klarigon: Mi ne estas neŭtrala, kaj mi ne deziras, ke MR estu neŭtrala. Mi ne povas memori, ke mi iam ajn pretendis, ke MR estu neŭtrala. Se en miaj artikoloj tamen troviĝas io interpretebla tiudirekte, la formulado dependas de neatento. Movado kun limigita kaj klare fiksita celado povas esti neŭtrala, ekz. la esperantomovado kiel nura lingva afero, la kooperativa movado ktp. Sed esti neŭtrala rilate al la tuta, nelimigita viveklado, tio signifus, ke oni restus pasiva antaŭ bono kaj malbono, justo kaj maljusto, ke etikaj valoroj estus al ni indiferentaj aŭ kvazaŭ ne ekzistus, ke la vivo entute ne enhavus ian spiritan celadon.

Ke MR ne estas neŭtrala ne signifas, ke ĝi estas komunisma, socialdemokrata, liberala aŭ dekstrula, eklezia aŭ ateista. Partioj, politikaj aŭ aliaj, estas laborgrupoj, kiuj reprezentas nur limigitajn partojn de la tuta aktiveco kaj celado de la homa vivo. Mi nepre rezervas por mi kaj por MR la rajton diri, ke ago aŭ penso estas bona, ĝi troviĝu ĉe komunistoj aŭ dekstruloj, ĉe religianoj aŭ ateistoj, kaj same pri tio kio estas malbona. Por povi tion bone fari, mi devas en mia pensado kaj prijuĝo sekvi certajn principojn, kiuj validas por la aktiveco kaj celado de la tuta homa vivo. Mi devas pensi kaj prijuĝi objektivice, tiel ke miaj vortoj estas adekvataj al la realo, tiom kiom tio estas ebla. Pri tio vidu la menciitan artikolon en nro 2/49. Objektiviceco ordinare ne estas absoluta. Pri la mankoj respondas nesufiĉaj scioj, tro malmulte evoluinta prijuĝokapablo, troa ligiteco al propraj sentoj kaj deziroj. Sed la ĉefa afero estas, ke ni rekonas la superan valoron de objektiviceco, adekvateco inter vortoj kaj realo, kaj ke ni konscie klopodas esti tiom objektivaj, kiom estas eble. Pli ni ne povas atingi, sed se ni tion farus, ni tamen estus farintaj unu el la plej grandaj atingoj en la homa evoluo.

Jen mi kaj sro Ŝorne faris certajn asertojn. Se iu trovas ilin falsaj aŭ suspektindaj, li rajtas rimarkigi kaj pruvi tion. Se ĉe ĉiuj troviĝas veremo, oni tiel povas atingi pli grandan objektivicecon ol per asertoj de unu sola persono. La angla samideano skribis, ke mi estus plej bone farinta, se mi estus eltranĉinta tiujn certajn liniojn en la artikolo de Ŝorne. Ĉu cenzurado estas ĝusta vojo por atingi pli da objektiviceco? (Ke oni favore al la objektiviceco ev. fortranĉas mokaĵn kaj persone atakajn vortojn estas alia afero.) Kiel dirite mi estas konvinkita, ke Ŝorne ne senpruve faris tian aserton. Sed ni supozu, ke mi eraras, ke la pruvoj de Ŝorne estas ŝajnaj aŭ eĉ falsaj. Pruvu tion, kaj mi kun ĝojo akceptos pli fide'lan informon pri la faktoj, kaj same Ŝorne, tion mi povas garantii. La angla samideano efektive ne pruvis, ke Ŝorne eraras, nur montris ke Usono helpis al Ĉiang Kaj Ŝek. Laŭ mia kompreno Ŝorne ne havis kaŭzon paroli pri tio, ĉar li ne rezonadis politikon. Li nur faris konstatojn, kia povos fariĝi la rezulto pri la homnombra problemoj, se Ĉinujo, influata de Sovetio (kio

do ankoraŭ restas pruvota aŭ refulota) iam havos la saman socisistemon, kiun nun havas Sovetunio.

Ĝespreble ankaŭ mi rajtas fari demandojn? Kion signifas: "volante esti politike neŭtrala oni nur alprenas la sintenon de la ortodoksio"? Ĉu ke efektive ekzistas nur du politikaj aroj, el kiuj unu estas ĉiel ĝusta en siaj pensoj kaj klopodoj kaj la alia nur erara kaj falsa?

Alia rimarkigo: Ne Ŝorne en sia artikolo sed mi en mia letero al la angla samideano konkludis, ke se Sovetio emas apogi komunismon (sovetian komunismon) ĉie en la mondo, ĝi povas eventuale apogi ĝin ankaŭ en Ĉinujo. Do, tio estas mia konkludo, ne de Ŝorne. Dum 25 jaroj mi legis ne tre multe sed tamen tiom da rusaj gazetoj kaj libroj, ke mi trovas tion tute klara. Laŭ la sovetia doktrino ĝia sociordo nepre, simple pro socievoluta leĝo, anstataŭos liujn socisistemojn, kiuj nun ekzistas en aliaj partoj de la mondo, kaj homo, kiu komprenas tion, nepre devas konformigi sian vivon, siajn klopodojn, por tiu estiĝanta, universala sistemo. Ano de sovetia komunismo, kiu ne emus subteni tian komunismon en aliaj landoj, estus kontraŭdira sovetio komunisto, same kiel esperantisto, kiu ne emus ĉie subteni esperanton.

"(Tamen en Jugoslavio?)", li demandas. Nu, ĉar temas pri iomete alispica komunismo, almenaŭ pri komunismo kun ĝuste nun aliaj aspiroj.

Germana letero

7.6.49.

... en nro 2/49 mi studis vian artikolon "Vortoj kaj realo", kio donis okazon apliki la legitajn principojn al la frazo (mal-supre sur paĝo 10): "La detruo kaj la suferoj ĉe la viktimoj de la germanoj" ktp. Tiu frazo, en rilato al la antaŭa, kie vi parolas pri malamo kreskigata ĝis fanatikeco, impresas, kvazaŭ vi ne havus ĝustan ideon pri psikaj statoj kaj movoj de la germanoj dum la hitlera interregado. Do ne ĉagreniĝu, se mi pro-

vas pentri ilin tiel, kiel mi, homo pli proksima al la eventoj pasintaj, ilin travivis kaj konceptis.

Vero estas, ke la granda p' multo de la germanoj aŭ tute ne aŭ nur tre malforte malamis siajn kontraŭulojn. Mi parolis kun multe da soldatoj dum ilia forpermeso, sed mi neniam konstatis tian malamon, precipe ne kontraŭ la simplaj soldatoj de la malamikaj armeoj. Oni do ne rajtas paroli pri ia fanatikeco de "la" germanoj. Vi nun argumentos: sed kiel vi klarigas la evidentajn kruelaĵojn en la koncentrejoj? Mi konfesos, ke grandparte mi ne povas ilin klarigi. Sed certe estas, ke almenaŭ naŭ dekonoj de la germanoj en sia konscienco ne sentas sin respondaj.

Kion vi negermanoj probable ne povas kompreni estas tio, ke la kruelaĵoj povis okazi sen la scio de la popolo. Mi ekzemple sciis pri la ekzisto de koncentrejoj, sed mi aŭdis paroli nur pri unu, nome tiu de Dachau apud München. Ĝenerale oni kredis, ke tie la homoj estas edukataj kiel nacisocialistoj, severe sed ne malhumane. Homo edukita al humaneco ne emas suspekti, ke aliaj estas kruelaj, precipe ne en institucio de la ŝtato. Kiam en 1945 la germanaj radiostacioj silentis kaj ni pere de la anglaj kaj luksemburga stacioj eksciis pri la koncentrejoj Buchenwald, Belsen ktp, multaj el miaj konatoj min demandis: "Ĉu vi jam sciis pri tio?" Kredeble oni povis teni sekretaj tiujn aferojn, ĉar la SS-soldatoj devis silenti.

Nun pri la judoj. Kompreneble ekzistis antisemitoj en Germanujo kiel en la plej multaj aliaj landoj. Judemuloj klopodas prezenti la aferon tiel, kvazaŭ ĉiuj judoj estus tute senkulpaj pri tiu fenomeno, ke la antisemitismo estus krimo fontanta nur el envio, netoleremo, malamo ktp de nejudoj. Sed amikon de vero tia klarigo ne povas kontentigi. Li serĉas patriron de la infano, sciante ke ankaŭ sentoj havas siajn kaŭzojn. La konkurenco de negocistoj povas instigi nur relative malgrandan nombron da homoj al antisemitismo.

En Germanujo vivis multe da judoj ankaŭ en malgrandaj urboj kaj en vilaĝoj. Plejparte ili loĝis tie jam de longe, vivis en paco kun la nejudaj loĝantaro, ĝuis estimon kaj konfidon kaj ilia komerco prosperis. Kiam oni dum la milito estis forkondukinta la judojn el granda vilaĝo proksima, oni arigis

por tio fortan taĉmenton da policanoj kaj ĝendarmoj, ĉar oni konis la ribeleman humoron de la vilaĝanoj kaj tial timis, ke ili perforte kontraŭstaros al la malliberigo de judoj.

Judparo en certa loko rifuĝis al du kamparaj familioj, loĝantaj sufiĉe izole en la ĉirkaŭaĵo. Unu familio kaŝloĝigis la viron, dua lian edzinon, en siaj domoj, nutris kaj prizorgis ilin, ĝis la amerikaj soldatoj ilin liberigis. Sendube entrepreno tre danĝera al la kampuloj. — En vilaĝo 20 km de ĉi tie vivis juda familio. Dum multaj jaroj mi ofte vidis la viron kun pakajo da ŝtofoj, kiujn li vendis en la ĉirkaŭaj vilaĝoj. Li mortis jam antaŭ la milito, sed lia edzino kredeble vivas ankoraŭ. Ŝi restis en sia dometo dum la milito, kaj ĉar ŝi posedis nenion, la vilaĝanoj zorgis, ke nenio mankas al ŝi.

Tiuj ekzemploj ilustru la fakton, ke la popolo en sia kerno ne malamis la judojn kaj eĉ per la propagando de Goebbels ne estis fanatikiĝinta. Sed en la grandaj urboj la cirkonstancoj estis aliaj.

La judoj laŭnombro estis nur unu ĝis du centonoj de la loĝantaro, sed malŝatante la profesiojn de manlaboristo kaj terkulturisto ili estis riĉiĝintaj precipe per komerco. La bankkapitalo estis plej grandparte juda, eĉ la privilegiita Reichsbank havis nur judajn akciulojn. La plej grandaj eldonejoj estis judaj, la ĵurnaloj, radiofonio, teatroj, filmoj estis regataj de judoj. La malmultaj nedependaj el ili signifis nur malmulte. La influo de la judoj al la spirita vivo do estis potenca. Pli ol ses dekonoj de la docentoj pri medicino estis judoj. Ili forte influis ankaŭ la juĝadon (Rechtsprechung) ktp. Kiom judoj regis la publikan opinifaradon montru jena ekzemplo: La pli grava el la du ĵurnaloj, iam aperintaj ĉi tie, foje estis postpresinta artikolon, kiu entenis ian kritikon kontraŭ la judoj. Tuj tiuj blokis la komercajn anoncojn, sen kiuj la ĵurnalo ne povis ekzisti. La bedaŭrinda eldonisto nun ĉiutage presigis plej flatajn riverencojn antaŭ la hebreoj, sed kelkajn semajnojn li devis pentofari pro sia senpripensa ataketo.

Jen komune homa emo: kiu fariĝis riĉa, tiu aspiras pli da riĉo, kiu akiris postenon, tiu volas firmigi kaj pliiĝi ĝin. Krome: kiu posedas potenceon, tiu inklinas ĝin malbonuzi. Eĉ ide-

alisma, prudente gvidata institucio, la katolika eklezio, des pli malbonuzis sian potencon ju pli tiu kulminis. (Eble en tiu malbonuzemo kuŝas tragika, kriza ĝermo de pasemeco de ĉia troa potencevoluo. (Vidu Hitler.)

La regado super inteligenta popolo de alirasa malmultnombra intelektularo ne povas daŭri, se la popolo estas unuanima, saninstinkta, fortkaraktara, sindefendema. (Ekzemplo: la kolonipopoloj nun emancipiĝantaj.) Oni do devas ĝin korupti, superŝutante la fontojn de popola forto, presigante amase librojn de kontraŭreligia tendenco, vekante obstrukcajn kaj ribelajn instinktojn en la manlaboristaro (la gvidantoj de la ekstreme maldekstraj partioj estis precipe judoj). — Mi ĉi tie ne konsideru la demandon, ĝis kia grado la emancipaj tendencoj de la laboristaro estis justaj, tamen ĉi tie nur pri klarigo, kiakauze antisemitaj sentoj povis esti en Germanujo. — Ne nur la posedantoj kaj socie privilegiitaj klasoj indignis, ke la judoj, kiuj ja ne korpe laborante, ne produktante ekonomiajn valorojn, rikoltis, kie ili ne estis semintaj, do unuavice estis la ekspluatantoj de la laboristaro, tamen arogis al si la rolon de popoldistributo, por forturni per tio la atenton kaj akiri ĉe la simpatio de la laboristoj. La cirkonstanco ke post la unua mondmilito rusaj kaj polaj judoj amase enmigris kaj per siaj koruptigaj, trompaj negocmetodoj kaŭzis skandalajn kaj skandalprocesojn (Barmat, Kutisker k.a.) kontribuis por fekundigi la grundon al la hitlera kontraŭjuda propagando.

Kiam oni dum la milito forkondukis la judojn, la gazetoj asertis, ke ili devos nun labori en municifabrikejoj, en konstruado de stratoj k.s. Oni trovis tion kredinda, ĉar ege mankis laboristoj. Kvankam mi profesie ofte faris vojaĝojn tra tuta Germanujo, mi neniam ekscelis pri kruclajoj hodiaŭ evidentaj. Sed jen unu escepto: En la komenco de 1944 vizitis min soldato. Lia kompaniestro, aŭdinte ke la viro forpermeso veturos al nia loko, estis komisiinta al li diri al mi siajn salutojn, ĉar mi iam konatiĝis kun la nuna kapitano. Mia edzino regalis la soldaton per cigaroj kaj iom da alkoholaĵo, en tiu tempo jam tre raraj artikoloj. Nun la viro iĝis babilema kaj i.a. rakontis, ke ie en Rusujo (de kie li venis) germanoj mortpafis ju-

dojn, inter ili ĉe knabojn. Mi demandis: "Ĉu vi vidis tion?" — "Ne, mi aŭdis rakonti pri tio." — La afero nin forte interesis, ĉar inter la judoj forkondukitaj el nia loko estis kelkaj, kiujn precipe ni ŝatis kiel homojn honestajn kaj estimindajn. Poste mia edzino demandis min: "Ĉu vi kredas, kion la viro rakontis pri mortigo de judoj?" — Mi respondis: "Li ŝajnas esti babi'emulo, kaj lia rakonto sin bazas sur onidiroj (er weiss es nur vom Hörensagen). — "Mi kredas nenion tian", diris mia edzino, "vidu, ĉu vi opinias, ke Otto K., Helmut Z., Werner H. kaj la aliaj al ni konataj estus kapablaj fari tian abomenaĵon?" — "Ne, certe ne." — "Nu, do aliaj ankaŭ ne farus tion."

Ĉirkaŭ la sama tempo venis al nia loko trajno kun 500 judinoj laborantaj en fabriko. Ia dubo pri tio ne ekzistis, ĉar mi mem vidis la transportpaperon. Tri semajnojn antaŭ ol amerikaj trupoj okupis la urbon, nia strato estis bombata de aviadiloj. Kelkajn tagojn poste mi vidis aron de tiuj judinoj, kiuj devis helpi ĉe la flankenigo de la rubo (efektive ili faris preskaŭ nenion, kaj la gardistoj indulge lasis ilin trankvilaj).

Ĉu estas mirige, ke la postaj sciigoj pri koncentrejoj nin forte surprizis kaj indignigis?

Do, kara samideano, mi lasus nun al via juĝo, ĉu oni prave povas paroli pri la viktimoj de "la" germanoj fanatikigitaj.

En kelkaj esperantaj gazetoj oni akre kondamnis la germanan popolon ĝenerale kaj la germanajn esperantistojn aparte. Sed oni devus ne juĝi pri aferoj, kiujn oni ne konas. Kiu emas nin kolektive kondamni, tiu sin demandu: Se mi mem estus loĝinta en Germanujo dum la hitlera epoko, ĉu mi estus antaŭvidinta kaj ekkoninta tion, kion ĉiuj nun scias? Se jes, ĉu mi estas povinta tion ŝanĝi kaj kiel? Se li estas justa kaj juĝokapabla homo, li ne povos jesi tiujn demandojn.

Li juĝu ankaŭ pri tio, ĉu nur germanoj montris sin fihojmoj. Amerika ĵurnalo kalkulis, ke ĉ. 15 milionoj da homoj pereis, inter ili trifoje pli da civiluloj ol militistoj, kaj ke la viktimoj en Germanujo proporcie superas multege tiujn de aliaj landoj. Sed ĉu oni konsideras, kiamaniere oni martirigis ilin per fajro kaj fosforo? Ĉu oni povas imagi la angoron de homoj, kiuj dum jaroj devis atendi sian percon per arbitre

falantaj bomboj? Ĉu la virinoj kaj infanoj estis kulpaĵ pri la milito?

Nur unu ekzemplo: Antaŭ la invadantaj rusoj la silczianoj fuĝis en Saksujon. Precipe en Dresden estis multaj centmiloj da rifuĝintoj. Nokte aviadiloj el la okcidento faligis tiom da bomboj, ke la tuta malnovurbo brulis. La homoj, kiuj povis sin savi de la amasbuĉado kaj el la fajro, rifuĝis en la du grandajn parkojn por eviti la varmegon. Kaj nun denove aviadiloj alflugis, ĵetis diskrevontan ŝtalon kaj fosforon sur la parkojn, kiuj estis bone percepteblaj kiel mallumaj makuloj en la fajromaro, tiel murdante la virinojn kaj infanojn, kiuj estis sukcesintaj sin savi de la unua masakro. Ĉu ili ne estus preferintaj la gazmorton en hitlera koncentrejo?

Kara samideano, intence mi prezentis al vi subjektive, kiel mi vidis kaj travivis la pasinton; mi estas certa, ke multaj samlandanoj legante tion dirus: jes, tiaj estis la aferoj. Sed mia intenco ne estas ion senkulpigi, eĉ ne en la senco de tout comprendre c'est tout pardonner. Kio okazis, tion oni ne povas fari neokazinta. Sed mi pensas, ke estas bone, ke iu, kiu partoprenas en la publika opiniformado, aŭdu la voĉon ankaŭ de la akuzito.

En tiu senco mi salutas vin

Revdemandoj

De GÜNTHER BÄMMERT

Vi foraj grizargentaj birdoj
kun ardflugiloj
matenonuboj,
en frua oro brilaj
de vekiganta tago,

vi pezaj ŝipoj
en alta bluo de tagmezo:
al kiuj landoj
velas vi
sopirŝargitaj?

Vi alta gralkastelo
neĝotura
ŝirmata de sunglavoj fruvesperaj,
al kiu estas trono vi kaj hejmo?

Vi ruĝlumantaj plumonuboj
en vesperard' brulantaj,
al kiu alta princo
purpuro via servas?
Kaj kiu man' artista
formadas tiel delikate?

Al kies vido floras
tion da belo
tagon post tago
sur la ĉielo?

Urba infano

De WILLIAM AULD

Vin ne ombras fagoj, pinoj
per trankvila folifasko:
nur fumtuboĵ de uzinoj
nubas super vin de nasko.

La alaŭdo vin ne vekas
per jubila tril' etera:
kie tirĉevalo fekas,
por vi tintas pep' pasera.

Tamen via kor' sopiras
prainstinkte al la belo,
kaj malklare vi primiras
brilon de hazarda stelo.

La Parlamenta Konsilantaro, kunsidinte multajn monatojn en Bonn por starigi Fundamentan Leĝon (provizoran konstitucion) al la (torsa) Federacia Respubliko Germanujo, decidis i. a.: *La mortpuno estas abolita*. Tiu decido estis ne unuanima; relative grandnombra malplimulto da parlamentanoj voĉdonis kontraŭe. Sekvis vigla diskutado inter la publiko; kelkaj ĵurnaloj publikigis leterojn de la legantero, kiuj per sia decide jesa aŭ nea sinteno montras la malfacilecon de problemo, pri kiu tamen kiu ajn kredas sin kompetenta por juĝi. Nature tia juĝo plejparte estas individua, laŭ tio, ĉu la juĝanto estas malvarme intelekta aŭ humane sentimenta homo. Rilate al la unua mental-eco estas tipa la multkonata diro de iam fama ŝtatalo: "Aboli mortpunon? Mi konsentas, sed sinjoroj la murdistoj komencigu!"

Post kiam Beccaria-Bonesana antaŭ ĉ. 200 jaroj skribis sian ĉefverkon "Pri krimoj kaj punoj", pledante por pli humana jurkoncepto kaj kontraŭ puno da morto, la disputo pri la demando ne ĉesis, kaj ankoraŭ nun opinioj kaj leĝoj varias en la diversaj ŝtatoj. Antaŭe la rajto de socio mortigi malbonfarinton ŝajnis nedubebla.

La greka kiel la romana juro jesis la mortpunon. Sed la greka ne konis ĝian plirigorigon per apartaj turmentoj. La maniero de plenumo estis malsama. Sokrates ekz. devis trinki el pokalo da konioveneno. Dum la lasta jarcento de la roma respubliko regis jam tendenco al tuta abolo de mortpuno; ĝi jam ne estis praktikata. Nur sub la imperiestro Antonius Pius ĉ. 180 p. K.) mortigo fariĝis la puno pro plej gravaj krimoj. Sed iom post iom oni punmortigis ankaŭ malpli gravajn krimulojn kaj kruelegis la ekzekuton pli kaj pli, ekzemple per bruligo, kvaronumo aŭ krucumo (ĉi tiu nur por sklavoj, ne por romaj civitanoj).

Dum la finiĝo de la mezepoko en Germanujo la puno de morto abunde estis verdiktata. Komence de la 16a jarcento sole en Nürnberg la ekzekutisto plenumis 1159 verdiktojn al morto dum 24 jaroj. Kaj en la 17a jarcento la fama juristo Bene-

diet Carpozov en Leipzig (mortinta 1666) diris 20,000 mortverdiktojn, plejparte en procesoj kontraŭ sorĉistinoj. (Li gloris sin, ke 53 fojojn li legis la tutan Biblion.) Ĝis la jaro 1810 en Francujo pro pli ol 115, en Anglujo samtempe pro 160 specoj de krimo minacis mortpuno.

La supre dirita libro de Beccaria iniciatis viglan, eĉ pasian disputon por kaj kontraŭ la mortpuno. La kontraŭuloj fine atingis forigon de la pliseverigata mortigo kaj iom-post-ioman limigon je malgranda nombro da gravaj krimoj.

Sendube la socio rajtas sin defendi kontraŭ krimuloj. Sed la gvida kriterio pri forigo aŭ daŭrigo de la mortpunado devas esti la demando, ĉu ĝi estas *necesa* por protekti la ŝtaton kaj la civitanojn. La ĉefargumento estis ĉi tie, ke la puno efikas detimige sur krimuloj. Ĉu efektive ĝi faras tion? Multaj ekspertoj neas tiun demandon vidante en la mortpuno ne la solan kaj ne sufiĉe efikan protekton, eĉ ne la sole taŭgan venĝon. Ili opinias, ke dumviva malliberigo pli bone konformiĝas al ambaŭ celoj. Ja en la normkazo la krimonto kalkulas, ke lia faro aŭ almenaŭ li mem restos kaŝita. Ankaŭ ne ŝajnas juste, puni homon ne nur pro tio, kion li faris, sed ankaŭ pro tio, kion aliaj ne devas fari.

Spertoj en la pasinteco kaj en multaj landoj atestas, ke oni ne pravas parolante pri detimiga, cvitiga forto de mortpuno. Eĉ la terure turmentaj ekzekutmanieroj en la antikveco kaj mezepoko tiam ne malpliigis mortigojn kaj murdojn. Aliflanke landoj abolintaj la mortpunon ne spertis rimarkindan aŭ daŭran kreskon de tiaj krimoj. En Italujo dum 1880 ĝis 1886 la juĝistoj verdiktis en meznombro 2776 kazoj de murdo pojare, post forigo de la mortpuno de 1890 ĝis 1892 oni kalkulis pojare nur 2103 tiajn kazojn, kaj en 1907 estis nur 1163 kazoj.

Kontraŭ la mortpuno pledas ankaŭ la eblo de juĝista eraro, kiu malgraŭ plej zorga konscienco ne tute estas evitebla. La koncerna literaturo prezentas multege da tiaj ekzemploj. La mortpuno plenumita estas neriparebla, la maljusto ne kompansebla. La nombro de "juĝmurdoj" estus malpli granda, se la ekzekutito ne estus senigita de la eblo sin defendi kontraŭ la maljusto, dum nun eble nur hazardo malkovros la veron. Kiu volas solvi tiun konflikton per esceptado de la kazoj, en kiuj nur

indicoj atestas la kulpon, premias nur la lertan, ruzan farinton kaj transdonas la malprudentulon al la eŝafodo. Li do turnas la sencon de morala punleĝo en la malon.

Inter la leteroj publikigitaj per "Die Welt" tiu kiu plej decide kaj senkompromise postulas pluan mortpunadon, estas de — virino. Tio ne nur psikologie estas interesa — virinoj ja estas pli forte impulsataj de sentimentoj ol viroj — ĝi krome estas simptoma pri la fakto, ke la problemo estas malpli jura kaj politika, sed signifas elkonsciencan decidiĝon, ekster aŭ flanke de la racio. Tiu virino ne volas, ke oni "amoplene" analizu la animstaton de la "bedaŭrinda" murdinto, sed ke oni konsideru la turmentojn de la kompatinda viktimo, eble eĉ virino aŭ infano, senkompate buĉita. Ŝi respondas al alia skribinto: "S-ro M. rimarkigas, ke kiel kristano oni devas rezigni liajn venĝometodojn. Kiel do? Li memoru la vortojn de la Biblio: "Kiu okprenas la glavon, tiu devas pereji per la glavo" (Mateo 26,52) kaj "Kiu verŝas homan sangon, ties sango ankaŭ devas esti verŝata" (1. Mose 9,6). Leĝo al la ĉiutaga vivo de kristano ja estu la Biblio."

La bibliaj citaĵoj estas tradukoj de Luther. Zamenhof tradukis: "Se iu verŝos sangon de homo, lia sango ankaŭ estos verŝita de homo; ĉar laŭ la bildo de Dio estas farita la homo." (Cetere la motivigo estas ne tre konvinka, se oni konsideras, ke ja ankaŭ la ekzekutoto estas laŭbildo de Dio.)

Jen do pravigo de la mortpunado per kristreligiaj konsideroj. Fakte jam dum longa epoko eklezianoj mem praktikis abunde la mortigon de herezuloj kaj aliaj malamiko, eĉ turmentante ilin per bruligo. Tio ĉiam strange min impresis. La eklezio ja instruas, ke Dio juĝos kaj punos la malbonulojn per la infera fajro, kaj ke neniu sin savos de Lia venĝo. Ĉu tiuj ekleziaj aŭtoritatuloj ne estis konvinkitaj pri tio kaj opiniis pli certa bruligi la pekulojn jam surtere? Kaj la jura principo: Ne bis in idem? (Ne punu dufoje pro la sama afero.)

La cititaj vortoj de Jesuo tekstas laŭ Vulgata: Omnes enim, qui acceperint gladium, gladio peribunt. Do ne: *devas* pereji per la glavo. Ankaŭ laŭ greka teksto ili "pereos per la glavo" (ĉar la kontraŭulo rebatos?) Konsiderante, ke Jesuo parolis tiujn vortojn, kiam Petro defendante sian majstron vundis

Malĥon, oni ne povas kredi, ke en tia kriza, emociiga situacio li volis doni leĝan instruon, ke oni glave ekzekutu krimulojn.

Cetere la citita loko sin trovas nur ĉe Mateo, la aliaj evangelioj ne entenas ĝin. Sed oni scias, ke Mateo tendencis konformigi sian evangelion al la juda leĝo, do ĝi ŝajnas malpli fidinda ol la du ceteraj sinoptikaj. Kiu rigardante ne tiom la apartajn vortojn penetris en la sencon kaj spiriton de la instruo de Jesuo, tiu instruo de amo kaj pardono, nepre rifuzos tian interpreton al punemo kaj venĝo.

Kial oni ne citas la vortojn ĉe Jeĥezkel 33,11? "Diras Sinjoro: Ne plaĉas al mi la morto de sendiulo, sed ke li sin konvertu kaj vivu. . . . Kaj kiam mi diras al sendiulo, ke li devas morti, kaj li sin konvertas de sia peko kaj faras, kio estas justa kaj bona. . . . li devas vivi kaj ne morti" (tradukita laŭ luthera biblio).

Laŭ moderna koncepto la punado celas trioblon: a) detimigi homon, kiun okazo eble instigos krimi (preventivteorio), b) rebonigi kriminton ankoraŭ edukeblan, kiun kutimo aŭ malfavora medio instigis; c) daŭre sendanĝerigi krimulojn jam ne korekteblajn (ekz. profesiajn krimulojn). Ekzekuto ne remoraligas kriminton, kontraŭe, ĝi malebligas reboniĝon aŭ riparon. Por eviti, ke krimulo plue minacos civitanojn, puno de morto ne estas necesa. La nuna praktiko en multaj landoj pruvas, ke per malliberigo oni atingas la celon same.

Certe la abolo de la mortpuno ne kreas idealstaton. Ne malpravas tiuj, kiuj argumentas, ke en iuj kazoj dumviva malliberigo signifas pli da kruco ol mortigo, precipe ĉe junaj krimuloj en priseksa rilato. Aliflanke la malkompatemon de multaj homoj kontraŭ krimuloj komprenigas ilia konsidero, ke por loĝigi, gardi, nutri, vesti tiajn sentaŭgulojn la honestaj devas kromlabori, kaj ke en mizerkvarta'oj de iuj urbegoj vegetadas malriĉuloj per peniga, zorgoplena, mizera vivo, ne sufiĉe prizorgate de la socio.

Pli humana formo de punado estas ekzilado en punko'oniojn, sed tio estas ebla nur al kelkaj kolonihavaj popoloj kaj preskaŭ jam ne al tiuj. Sed ankaŭ ĉi tiu punmetodo povas fariĝi nur alia formo de mortigo, se ĝi okazas sub rigora kondiĉoj,

kiel malsaniga klimato, unuforma, malabunda nutraĵo, netaŭga vestado, troa laborstreĉo ktp.

El alia, pli moderna vidpunkto letero de iu D-ro W. rigardas la problemon: "La abolo de la mortpuno estas bedaŭrinda, ĉar la mortigo de komandanĝeraj krimuloj estas ŝtatnecesa. Sed io alia estas la procedo, miaopinie reformenda. La hodiaŭaj manicroj, aparte senkapigo kaj pendigo, estas tro kruclaj, ĉar ili konservas la konscion de la ekzekutoto. Oni ne kontraŭdiru, ke ĝuste la konscia ĝisvivado de la lastaj momentoj apartenas al la puno. Tiu argumento miskonsideras la problemon. Ĉiu mortverdikto estas jam tiel rigora puno, ke la ekzekutado devus esti farata tiel humane kiel eble. Ĉar ja la fincelo estas eliminado el la homa socio. Aŭ ĉu oni kredas, ke sub influo de solenaj ekzekutformalaĵoj la punato morale puriĝos?"

Jen atentinda propono al tiuj, kiuj rigardas la problemon kiel veraj homoj rezonante: mi devas liberigi la socion de tiu morale aŭ eble ankaŭ mense malsana malbonfarinto, sed mi faru tion sen sentimentoj de punemo kaj venĝemo per la plej humana maniero, dankante al Dio, ke Li starigis min en favoran medion, kie eventuale latentaj kriminstinktoj kaj pasioj ne disvolviĝis, aŭ ke Li dotis min per sufiĉe da karakterforco aŭ eĉ da amo al ĉio bona kaj nobla.

Sed anstataŭ doni al la ekzekutoto eblon senbrue kaj diskrete foriri el sia fuŝita vivo, oni atentege gardas kaj observas lin, por ke li ne propravole sin mortigu. Kondamnitajn, kiuj estis tranĉintaj siajn arteriojn, oni zorgeme flegis kaj kuracis por poste ilin laŭprograme kaj ccremonie ekzekuti.

Mi finas per la traduko de alia letero: "La pledantoj por mortpuno posedas same tiel konvinkajn argumentojn kiel la kontraŭuloj. Ambaŭ opinioj estas nerefuteblaj, ĉar ili radikas en malsamaj mondkonceptoj. Objektive rezonanta racio kaj religie ligita konscienco, precize dirite kapo kaj koro, aŭ ratio kaj humanitas staras unu kontraŭ la alia. En la diskuto estas pli facile al la progmatikulo ol al la etiku'o konverti aliajn al sia opinio. La unua povas prezenti konkretajn kialojn, la alia kontraŭmeti nur abstraktajn konsciencprincipojn. Do ili batalas

per neegalaj armiloj. D-ro K. verŝajne pravas opiniante, ke en popolbalotado la plimulto voĉdonus por daŭrigo de mortpuno. Sed tio pravas nur, ke la plimulto estas obsedata per pensado laŭ la utileco; ĉu poste la problemo povos esti rigardata kiel solvita, tio estas kontestenda."

Meditoj de nespiritisto pri spiritismo

De C. JOON

Mi estas serĉanto. Tio signifas i.a., ke mi ne tuj estas kontenta pro klarigo de problemo, kiu nur laŭ unua vido ŝajnas klarigo.

Krome mi volas ne kredi, kion ajn oni rakontas al mi, sed deziras kompreni.

Kaj jen mi plurfoje jam koliziis kun problemoj de spiritismo.

Ili ampleksas vastan terenon kaj en la spiritista movado estas diversaj tendencoj. Mi scias ke kelkaj diferencigas inter "spiritistoj" kaj "spiritualistoj". Tiu distingo ne interesus min, ĉar fine ni ĉiuj, se ni deziras nomiĝi seriozaj homoj, klopodas al komprenado de ĉio. Faktaj titoloj do ne multe gravas. Iuj deziras nur atenti specifajn fenomenojn kaj nur travivi ilin, indiferece al ĉia teoriado pri ili. Aliaj deziras klarigi, se eble ekzakte science klarigi, kiel la diversaj fenomenoj spiritismaj okazas, estiĝas, ktp. Estas fakto simpla, ke okazas en nia malgranda mondo ankoraŭ multaj fenomenoj, ĝis nun ne klarigitaj.

Kaj la rutina reakcio de la homaro ĉe tiaj kazoj estas, ke oni nomas tiujn fenomenojn "supernaturaj". Poste, kiam oni trovis ordinaran naturan klarigon, oni senbrue forstrekas la vorteron "super-".

Rilate al la spiritismo ni troviĝas ankoraŭ en la brua periodo. La "supernatureco" incitas multajn homojn, igas ilin diri ĉiajn adoraĵojn pri siaj mirakloj, ktp.

Kontraŭe la parapsikologio k.s. gajnas terenon kaj fidon, kvankam starantaj ankoraŭ en la infanĝuoj (tion diras la fakuloj mem).

Ĉar mankas ekzaktaĵoj, estas logike, ke oni eklaboris per hipotezoj, ofte ne plu konsciante ke "hipotezo" finfine signifas: "ni ne scias".

Unu el la hipotezoj por klarigo de multo (ne de ĉio) okulta, estas la spiritoteorio, laŭ kiu per la morto de homo liberigas lia "animo", "spirito" el la severa kaptito de la materia korpo kaj komencas propran, memstaran, senmortan pluvivadon, nematerian, neteran. Tio ĉi komenciĝas la malfacilaĵoj.

Pluraj fenomenoj kaj ankaŭ eksperimentoj unuavide ŝajnas per siaj frapaj faktaĵoj pravigi tiun hipotezon, sed — — —

Se ni logike rezonas la homo estas ne ia io, *havanta* korpon, animon kaj spiriton, sed *estas* la viva triumfo de tiuj "aferoj". Tio signifas, ke korpo kaj animo kaj spirito estas tri "facetoj", aspektoj", "stadmanieroj" de unu sama tuto, ne apartigeblaj kaj nur neapartigite distingataj.

La homa pensado, ligita al vortoj kaj sia propra historio, ĝenerale ne liberigis sin de multaj pensaroj de antaŭ eĉ multaj jarcentoj. Nur tio ebligas la craron ke oni "dispensas" la homon.

Krome tiaj "disigoj" estas tipaj por la prudenta pensado, sed kontraŭaj al la logiko, la dialektiko de la racio, La mezepoko, ankoraŭ ne atinginte la racion, bredis tiajn dispensojn. La granda amaso hodiaŭ ankoraŭ ne superas tiun mezepokan stadion de penskapablo.

Krome: ni povas facile konstati ke ĉiu homo, kiu naskiĝis, de tiam estas aparta, nova, integra homo, diferenca de ĉiu alia.

Tio do estas ordinara komenco de io nova. Sed ĉio, kio havas komencan, ankaŭ havas finon. La unua ne estas pensebla sen la alia, same kiel ankaŭ la vivo ne estas pensebla sen sia kontraŭo, sia neo: la morto. Kaj se mortas la tuto (vidu supre) per tio malaperas definitive ankaŭ ĝiaj "aspektoj", finiĝas ĝiaj "stadmanieroj".

Restas eblo por klarigo de la spiritismaj fenomenoj el la faroj (event. ne- aŭ subkonsciaj) de la medioj, t.e. ĉiuj fenomenoj estas rezulto de aktivado de la subkonscio de vivan-

ta(j) homo(j). Per tio mi do ne volas diri, ke laŭ mi ĉiu psikometristo aŭ alia mediano, kiu asertas "ricevi sciigojn el la alia mondo", estas trompanto, kvankam okazas sur tiu ĉi tereno multaj ĉarlatanaĵoj, sed nur ke ili mem ne scias ĝuste kion ili faras, kion sinceraĵoj ofte konfesas kaj kio malfortigas la pruvan ofikon de iliaj faroj.

Malfacilaĵo ĉi tie estas la nebulo de ekzakta kontrolo. Krome la fenomenoj estas ofte tre mirigaj, elmontras sciojn kaj kapablojn, ordinare tute fremdajn al la personoj, kiuj manifestas ilin. Alia malfacilaĵo estas, kiel klarigi la konsciigon, kiu okazas ĉe la mediano pri aferoj, kiuj ofte restas tute subaŭ nekonsciaj ĉe la ĉeestantoj.

Kaj ankoraŭ demando: en kia grado estas en ni, do ankaŭ kaj speciale en nia subkonscio, akumulita la sperto de niaj antaŭuloj?

La hereda teorio lasas tiurilate multon por demandi. Oni povas kontraŭdiri ke la subkonscio en ĉiu tiu kazo do devas esti io, kapabla plenumi grandiozajn farojn. Efektive. Sed ĉu do ekz. la "ordinara" intuicio de tempo al tempo ne plenumas tre brilajn farojn? (Ke Hitler ne sukcesis, ne estas kulpo de vera intuicio, kvankam eĉ Hitler ne tute malsukcesis.)

Tamen mi ne povas akcepti la ideon pri ia "universala subkonscio", kiu estus la baseno en kiu konserviĝus ĉiuj okazintaĵoj de la mondo, iel rilatantaj al homaj spiritoj, ĉiuj "postsignoj" de faroj, pensoj, sentoj, ktp.

Tiu universala baseno (kie ĝi estu?) estus io, sekve limigita i.a. laŭ spaco kaj tempo kaj en niaj rezonoj pro sia nelogikeco neuzebla.

La ĝenerala (sub)konscio, la ĝenerala homa spirito ja povas esti reala nur en kaj same kiel la individua, unuopa, pensanta (ktp) homo.

Kaj pri la spiritoj: kie ili restadu? kiel ili konserviĝu? Kiaj ili estu? Ja certe iel difinitaj, ĉar ili estas laŭ la spiritistoj integraj unuoj, do *ioj*, *do ankaŭ limigitaj laŭ spaco kaj laŭ tempo*, ĉe kio ni povas pripensi, ke spaco kaj tempo estas esence la samo, sed realaj en diversaj manieroj.

Ĉio, kion ĝis nun mi legis kaj aŭdis pri "spiritoj" ktp, faras al mi la impreson esti fantaziaĵo de vivantaj homoj, ideoj ne

plene ellaboritaj, trapensitaj. Se ni volas klarigi la aferon, ni devos laboradi per klaraj konceptoj, tute trapensitaj.

Mi tre ŝatus klarigi la spiritaĵn, spiritismaĵn, fenomenojn absolute pure logike kaj volonte akceptos ĉe tio ĉies kompetentan helpon, en formo de "kontraŭartikoloj" en MR (se la red. permesas), aŭ per korespondo al mia adreso.

C. Joon, Schagen. A 31, Nederlando.

MR povos doni iom da loko al la temo, se la artikoloj estos konci-
zaj kaj okupos sin pri dirindaj aferoj. — La Red.)

Kio estas metapsikio?

De K. WILGENHOF

Metapsikio estas scienco ankoraŭ juna, kvankam la fenomenoj, kiujn ĝi traktas, estis konataj jam en la plej frua tempo de la homaro, tiam eble eĉ pli ol hodiaŭ. Ili vekis timon kaj respekton, mokon kaj malestimon, miron kaj scivolon.

En 1882 oni fondis en Britujo la unuan societeton por metapsikia esplorado. Ĝia unua prezidanto, Henry Sidgwick, diris kelkajn vortojn tre atentindajn. Mi forte rekomendas al la leganto bone atenti ilin, antaŭ ol li legos plu. Tiuj vortoj estis:

"Ni unuanime opinias, ke nian esploran gvidu sole la deziro koni faktojn, sen iu ajn anticipa juĝo pri ilia valoro."

Faktojn la societanoj deziris koni. Tio estis motivita. Malofte la faktoj estis, kaj bedaŭrinde ankoraŭ estas, tiom komplikitaj kaj kaŝitaj de fantazioj, superstiĉoj, troigoj kaj trompoj kiom en la metapsikia kampo.

Faktoj kontraŭ fikcioj.

Kio estas la studobjekto de la metapsikio? Ĝi ne estas unu sed aro de tre diferencaj aferoj, kiuj tamen probable apartenas al unu spaco. Ili ĉiuj koncernas eksterordinarajn kapablojn, kiujn kelkaj homoj posedas. En kelkaj kazoj ili estas eĉ tiom neordinaraj, ke ili estas apenaŭ kredablaj. Multaj homoj ri-

markis tiujn povojn en si mem nur du, tri fojojn en la vivo, sed ĉe aliaj ili estas oftaj, eĉ kutimaj.

Iuj el tiaj homoj per vizio aŭ halucino perceptas okazon sendepende de siaj sentumoj. Tiel la konata Svedenborg, estante en Gotenburgo, perceptis la grandan brulon en Stokholmo. Iam iu rakontis al mi, ke li "vidis" la morton de sia patro, kvankam liu estis en alia urbo. Kiam oni volis informi lin pri la okazo, li povis diri al la informantoj, kiuj homoj ĉeestis la forpason.

Aliaj antaŭsentis aŭ antaŭsonĝis ion, kio poste okazis. Sufiĉe konata estas antaŭavertoj pri danĝeroj kaj neatendita alveno de homoj, pri kiuj oni ĵus parolis. Pluajn tiajn ekzemplojn pli detalajn la leganto trovas en la jarkolekto 1946 de MR, nro 1 p. 17, nro 3 p. 28, nro 4 p. 41.

Alia afero, konata sub la nomo telepatio, evidentigas la eblon de rekta pensinterkomuniko sen uzo de parolo, skribo, gesto, tuŝo aŭ alia materia rimedo. Ekzemple: iu patrino legis en romano ion, kio tre tuŝis ŝin. Estis rakonto pri viro, kiu estis pendigota. Subite la fileto kriis en sonĝo. Veninte al lia lito la patrino ekscias, ke li havis timigan sonĝon pri viro, kiu oni volis pendigi.

La verkinto de tiu ĉi artikolo memoras sian bonan prenon dum ekzameno, en kiuj la kandidatoj devis loli pri la taskoj. Estis konate, ke unu el la taskoj estas facila, kaj evidente pro telepatia kontakto kun la ekzamenanto la mano kvazaŭ estis tirata al la koverto, kiu entenis tiun.

Rimarkindaj estas ankaŭ la fenomenoj de hipnoto kaj t.n. magnetismo. Ambaŭ terminoj koncernas kapablon de homo, kiu per ia influo de sia spirito povas efiki al alia homo. Ĉe hipnoto la hipnotigato eniras profundan dormon, en kiu li kvazaŭ aŭtomate plenumas diversajn agojn, kiujn la hipnotiganto ordonas. Ke la hipnota dormanto povas esti tre nesentanta pruviĝis el tio, ke la skota kuracisto Esdaile en la mezo de la antaŭa jarcento plurfoje operaciis hipnotigitajn pacientojn sen uzo de anestezilo. Per homa magnetismo kelkaj personoj celas liberigi malsanulojn de iliaj suferoj. Ankaŭ pri tio ekzistas trafaj ekzemploj.

Pli strangaj estas la spiritaperoj de vivantoj kaj ŝajne eĉ de mortintoj, kio eble estas pli perfekta formo de telepatio, la su-

pozataj interkomuniko kun mortintoj kaj materiaj efikoj de psika forto. Pri la du lastaj aferoj okupas sin la spiritistoj. Mi avertas la legantojn pri eventuala miskompreno. Spiritismo ne estas metapsikio. La unua estas simila al kredo, mondkoncepto; la dua estas nek pli nek malpli ol scienco.

Jen la fenomenoj. Laŭ la ĝenerala konvinko de la publiko ili estas eksterordinaraj kaj strangaj. Oni sentas en ili ion misteran, sekretan, kaŝitan. Pro tio estigis la vorto okulta, kiu signifas kaŝita, por signi la nomitajn fenomenojn. Aliaj preferas la kvalifikon paranormala (para estas klasikgreka por apuda, laŭlonga). En la metapsikio la esprimo "paranormalaj fenomenoj" estas jam sufiĉe multe uzata termino.

Multaj personoj dubas pri la realeco de paranormalaj aferoj. Ĉu homo povas vere vidi en la estontecon? Ĉu oni povas percepti ion okazantan en alia lando aŭ malproksima urbo? Ĉu ne estas fantazio aŭ trompimago, nura superstiĉo, ke oni povas vidi fantomojn kaj aŭdi voĉojn de mortintoj?

Ne malmultaj malestimas aŭ moke levas la ŝultrojn pri la spiritalaj aferoj. Ili pensas pri ideoj, kiujn la racio jam antaŭ longe venkis: magio, sorĉado, aŭguroj kaj orakoloj; pri suspektindaj personoj, kiuj kontraŭ alta pago pretendas antaŭdiri ies estontecon k.s.

Ili opinias, ke moderna, civilizita homo ne povas serioze rilati al tiaj sensencaj aferoj, kiuj tutsimple ne estas eblaj laŭ ilia mondkoncepto. Kaj aliaj kritikantoj alportas ekzemplojn pri eraroj faritaj de profesiaj antaŭdiristoj kaj pro trompoj okazintaj dum telepatiaj kaj spiritistaj kunsidoj.

Al tiuj lastaj ni povas respondi jene: Fiparoloj, babiladoj ne signifas, ke la homa parolkapablo estas neĝusta aŭ netaŭga. La ekzisto de trompfotografado ne kondamnas la fotografian arton.

Kaj kion respondi al tiuj, kiuj kredas la fenomenojn neeblaj? Unu el la unuaj esplorantoj de okultaj fenomenoj diris: "Mi ne asertis, ke ili estas eblaj, mi diras nur ke ili estas veraj." La demandoj ĉu okultaĵoj estas eblaj kaj kiel ili estas eblaj ne havas multan sencon. Tiuj demandoj ofte apenaŭ kaŝas, ke la demandinto volas akcepti la paranormalajn aferojn nur se

ili akordas kun lia jam antaŭe formita mondkoncepto. Kaj cetere — imagu, ke io estas ebla sed ne okazas!

Pli grava estas la demando, la scienca demando, ĉu io estas fakta. Memoru la diron de sro Sidgwick! Do ni demandu ne ĉu paranormalaj aferoj *povas* okazi, sed ĉu ili *okazas*. Ĉu oni demandas pri la eblo de atomenergiaj eksplodoj? Ne, oni konstatast ilin, kaj cetere oni povas, se oni deziras, studi la leĝojn, kiuj fiksas la atomfizikajn aparaĵojn.

Esploroj kaj eksperimentoj.

Same faras la sciencisto metapsikia. En la komenca periodo la sciencaj esploroj estis nur kromokupoj de kelkaj fizikistoj, inĝenieroj, filozofoj kaj aliaj, kiuj atentigis pri la eksternormalaj aferoj en spiritismo kaj hipnotismo kaj decidis serioze kaj objektivc studi tiujn fenomenojn. Al tiuj pioniroj apartenis la fama kemiisto Crookes, kiu ekzamenis spiritismajn aparaĵojn, Mesmer, medicinisto, al kiu oni plej ofte atribuas la malkovron de homa magnetismo, la germana inĝeniero Teichenbach, inventinto de parafino kaj kreozoto, kiu eksperimentis pri homa magnetismo, la itala psikologo Lombroso, antaŭe refutanto de paranormalaj fenomenoj, kiu poste sentis neceson studi ilin, la franca fiziologo kaj nobelpremiito Richet, kiu kiel unua aplikis matematikajn metodojn (ŝanckalkulo) ĉe eksperimento de antaŭsciado.

La elekto de tiuj nomoj estis nur arbitra. Pluraj aliaj indus mencion. Pli kaj pli da personoj aliĝis al la sistema kaj kritika esplorado. La fondon de la brita societo por metapsikia esplorado kaj ĝia revuo sekvis krco de similaj societoj kaj revuoj en Francujo, Germanujo, Usono kaj aliloke. Grandiĝis la nombro de faktoj, kiujn oni kolektis kaj studis. Ampleksaj detalaj verkoj kun multaj ekzemploj de homaj spertoj rilate al paranormalaj aferoj estis skribataj de F. W. H. Myers, E. Gurney, F. Podmore kaj E. Osty. Iliaj verkoj fariĝas klasikaj en la metapsikia fakliteraturo.

En 1882 Henry Sidgwick diris: La sciencista nekredemo povis tiom longe kreski kaj havas tiom da radikoj tiel fortaj, ke ni povas nur mortigi ĝin — almenaŭ se tio estos al ni iel ebla.

koncerne tiujn demandojn — entombigante ĝin sub amason da faktoj."

Antaŭ pluraj jaroj skribis metapsikia esploranto: "Mi nun sufokiĝas sub faktoj."

Ne plu mankas nemiskompreneblaj faktoj. Grandan nombron oni rikoltis per sistemaj eksperimentoj, kaj tio estas tre grava por la scienca valoro de tia esplorado. Ekzemple la meritplena franca metapsikiisto E. Osty plenumis per pluraj viroj kaj virinoj serion da eksperimentoj pri antaŭsciado. Ni ĉerpu nur unu ekzemplon el lia verko.

En decembro 1913 antaŭdiristino profetis al iu sinjorino kelkajn okazaĵojn rilate al junulo. Post ĝusta priskribo de lia karaktero ŝi diris: "Mi vidas lin baldaŭ malsaniĝi, dum li estas ekzamenata — mi malgraŭ peno ne povas vidi lin eniri la lernejon, por kiu li sin preparas — li trapasos laborplenan vivon, sed li mortos juna, kvazaŭ sur batalkampo".

Post kelka tempo la junulo eksuferis de malgrava angino, kiam li estis transpasonta ekzamenon pri korpa taŭgeco. Kelkajn monatojn li tre aktive utiligis sin. En julio 1914 lia enira ekzameno por teknika lernejo estis ĉesigata de la militkomenco. La 1-an de decembro li aliĝis al artileria regimento, malsaniĝis la 8an kaj mortis la 13an en hospitalo, pro meningito.

La vorto "kvazaŭ" en la antaŭdiro montriĝis tre signifa.

Plurajn tiajn kazojn kolektis kaj priskribis Osty en granda verko, unu el la klasikaj en la metapsikia verkaro.

Prof. J. B. Rhine ĉe la Duke-universitato en Usono liveris en sia libro *Extra-Sensory Perception* la rezultojn de 90,000 eksperimentoj pri telepatio kaj paranormala eksciado. Lia plej sukcesa provpersono en 275 provoj divenis ĝuste 87 fojojn. Se li estus diveninta nur hazarde, tiu nombro povus esti nur 55, ĉar ĉe ĉiu provo li povis e'ekti unu el kvin figuroj troviĝantaj sur la nevideblaj flankoj de kartoj. Rhine intence simpligis la eksperimentojn, uzante kartojn kun figuroj, ĉar tio obligas aplikon de ŝanekalkulado por konstati ĉu kaj kiom la rezultoj superas la hazardon. Similajn eksperimentojn aranĝis S. G. Soal en Usono, Prof. Tyrell kaj Whately Carington en Anglujo, prof. Heymans en Nederlando kaj aliaj.

Okazis ankaŭ interesaj eksperimentoj pri homa magnetismo kaj spiritismo, sed pri ilia scienca valoro la opinioj estas diferencaj. Kelkaj studentoj konsideras nur telepatio kiel reale ekzistantan. Ĉiujn aliajn paranormalajn fenomenojn ili volas klarigi kiel specon de telepatio.

Konkludoj kaj konsideroj.

Kion ni povas konkludi el ĉi tio? Kiel oni klarigas la paranormalaĵojn? Ĉu oni scias, kio estas la kaŭzo de antaŭsciado, ekstersentuma perceptado ktp.?

Estas vere, ke la diligentaj esploringoj trovis tiajn regulojn kaj ecojn. Telepatio plej ofte okazas inter personoj, kiuj estas intimaj inter si, ekz. parencoj, geamantoj, geedzoj k.s.

La distanco inter la personoj probable neniel influas telepatiajn kontaktojn. Ĉiuj homoj havas paranormalajn povojn, sed ĝenerale ili estas etaj kaj apenaŭ konstateblaj.

Ne estas vere, ke antaŭdiristinoj scias ĉion, kio estonte okazos. Ofte tiaj antaŭdiroj estas nur nebulaĵoj, kaj ofte oni atribuas al ili eraran signifon! Same la ekzisto de telepatio ne implicas, ke kelkaj homoj povas senĝene ĉerpi el la mensoj de aliaj.

Antaŭscioj preskaŭ ĉiam koncernas personajn aferojn, apenaŭ ĝeneralajn, mondgravajn, sed ofte la unuaj pli malpli klare indikas al grandaj mondokazoj. Tiel la nederlanda metapsikiisto dro W. H. C. Tennhaeff pruvis en serio da antaŭscioj devenintaj de multaj diversaj personoj, ke la dua mondmilito okazos, jam jarojn antaŭ ĝia okazado estis antaŭvidebla, eĉ kun sufiĉe da konkretaj okazoj.

La metapsikiaj aferoj starigas antaŭ ni kelkajn ekstreme gravajn problemojn. Unu el ili estas la filozofia demando pri determinismo. Ĉu ĉiu homa vivo okazas laŭ antaŭfiksita skemo? La faktoj koncerne konojn de antaŭsciado povus konkludigi tion. Sed ekzistas ankaŭ ekzemploj de tiaj kazoj, en kiuj la anoncita okazo aŭ stato estas evitata. La demando pri sorto kaj destino estas ankoraŭ ne solvebla, se ĝi iam estos.

Kelkfoje oni klopodis elpensi sciencon teorion, laŭ kiu oni povus komprenigi la metapsikiajn aperaĵojn, same kiel la fa-

maj elektrona kaj relativeca teorioj klarigas fizikajn fenomenojn. Oni starigis diversajn hipotezojn por prezenti klarigan bildon pri apartaj paranormalaj faktoj, sed ankoraŭ ne aperis ĝenerala teorio, kiu validas por la tuta vasta tereno de la metapsikia studado. Komence oni volis klarigi telepation, ekstersentuman perceptadon kaj antaŭsciadon per aparta, speciala sentumo, kiun ĉiu homo havas, sed tio baldaŭ montriĝis nekonvinka. Same la hipotezo pri speciala radiado kondukas al tro da neklarigeblaj komplikajoj.

Pli sukcesa estis la supozo pri universala animo, el kiu kvaŝaŭ kreskus la homaj animoj. Simile al iuj plantoj, kiuj staras ŝajne apartaj, sed kies radikoj konsistigas unu reton en la grundo, la homaj mensoj interligiĝus per la universala animo.

Sur tiu hipotezo Whately Carington bazis sian rimarkindan teorion, publikigitan en 1945. Li rigardas telepation kiel pensasociadon. Pensasocioj estas ĉiuminutaj fenomenoj ĉe ĉiu homo. Se vi ekpensas pri io ajn, tio emas tuj pensigi vin pri dua afero, kiu siavice kondukas al tria ktp. Se oni jesas, ke la homaj mensoj estas ne apartaj sed havas komunan bazon, tiukaze fariĝas akceptebla, ke in penso ĉe unu homo povas fariĝi en lia konscio asociita penso el la menso de alia persono.

La verko de Carington montras vastan perspektivon ne nur pri telepation sed ankaŭ pri postmorta vivo, homgrupoj, efikado de propagandoj, gvidado de nacioj. Tamen ĝi estas mankohava koncerne ekstersentuman perceptadon kaj antaŭsciadon. Finante tiun ĉi artikolon mi konscias, ke mi verŝajne lasis neresponditaj plurajn demandojn de la legantoj. Ekzemple ankaŭ la scienca esplorado de astrologio, hironantio kaj rabdomantio (kapablo trovi akvon, mineralojn kaj aliajn objektojn per la indikilo, ekz. forka bastono) apartenas al la metapsikia studkampo.

Mi ankaŭ ne rakontis pri la ruzaĵaj manieroj, kiujn la metapsikaj eksperimentistoj elpensis por malebligi ĉiujn trompojn aŭ sintrompon kaj por silentigi ĉiun severan kritikon de kontraŭuloj pri ilia laboro. Sendube la metapsikia fako pli prosperis pro la sinteno de nekredemaj kritikantoj ol pro la senbrida

strangemo de pluraj fantaziuloj. Ĉar la celo de la metapsikio ne estas kulturi fantaziaĵojn sed nepre estas kaj nepre restos pli kaj pli ekkonigi faktojn.

Rimarkigoj pri kelkaj terminoj.

En esperanto ekzistas ankoraŭ malmulte da metapsikaj terminoj, kaj la esperantigo de t.n. internaciaj fakterminoj ne estas facile farebla, ĉar tiaj ne multe ekzistas en metapsikio. Ĝenerale mankas unueco koncerne la nomigojn. En pluraj kazoj troviĝas por unu afero pli ol unu nomo. Ekzemplo pri tio estas la nomo de la scienco mem. En metapsikiistaj rondoj en Usono, Germanujo kaj Nederlando oni ofte uzas por ĝi la naciolingvajn ekvivalentojn de "parapsikologio". Tiun nomon elpensis la franca filozofo Boirac, sed en Francujo oni plej ofte diras "metapsychique", kiun vorton oni imitis en Plena Vortaro.

La dua rimarkigo koncernas la terminon "ekstersentuma perceptado", kiun mi uzis, kvankam ĝi estas iom longa. Mi tamen preferas ĝin, ĉar alie mi verŝajne devus uzi "klarvidado", kiu vorto respondas al la germana "Hellsehen", la franca kaj angla "clairvoyance". Sed "klarvidado" havas malavantaĝojn. Unue la koncerna paranormala perceptado ne estas vidi laŭ kutima signifo, do ne per la okuloj; ofte ĝi similas al aŭdi, palpi kaj malofte eĉ flari. Due ekstersentumaj perceptoj ne estas ĉiam klaraj. Kontraŭe ili ofte estas nebulaj kaj fragmentecaj.

Kiel kreskigi la legemon?

De EINAR HULT

Tre ofte okazas, ke verkistoj kaj eldoncoj de esperantolibroj plendas, ĉar la eldonitaj libroj ne sufiĉe rapide vendiĝas. Nur malofte ili vekas la intereson kaj legemon, kiun oni atendis. Sendube la plendoj kelkfoje estas motivitaj, sed la demando tamen estas, ĉu la eldonistoj ankaŭ mem ne grave kulpas je la malsukceso. Pro kio ili kulpas? Laŭ mia opinio ili forgesis gravan faktoron, kiam temas pri libroj, nome la aspekton kaj veston de ili. La vesto kaj papero

de libro ludas la saman rolon, kiun ludas belaj vestoj por virinoj. Ju pli belan veston la virino portas, des pli ŝi estas atencata de la viroj. Tiel estas ankaŭ koncerne librojn, ĉar bele ornamita libro ne nur legas kaj altiras la intereson de la fidelaj aĉetantoj sed vekas ankaŭ la scivolemon de personoj, kiuj ĝenerale ne dediĉas sin al legado.

Ni kritike rigardu la plimulton el la jam eldonitaj libroj. Ĉu multaj el ili vere meritas la epiteton belaj? Kian kvaliton havas la papero? Ĉu estas strange, ke la metiaj bindistoj rifuzas bindi la librojn al ni? Tute ne! Ofte la papero estas el tiom malbona kvalito, ke ne eblas tranĉi la randojn de la folioj. Ĉu estas strange se oni ne volonte montras tiajn librojn al personoj, kiuj iom interesigas pri nia afero? Kompreneble la eldonistoj rapidas defendi sin asertante, ke ne estas eble eldoni luksajn kaj bonkvalitajn librojn el ekonomia vidpunkto. La eldonnombro estas tro modesta.

Bedaŭrinde la esperantistoj ne nombras milionojn da legantoj, sed tamen troviĝas granda nombro da legemaj esperantistoj, kiuj kun ĝojo (miksite kun malĝojo pro la supre menciitaj kialoj) salutas la aperon de ĉiu nova verko en esperanto. Ili ne nur salutas, sed ĝenerale aĉetas la novajn librojn. Sed kiom ofte okazas, ke ili ricevas libron, kiu kaj enhave kaj aspekte kontentigas ilin? Feliĉe la enhavo de la libroj ĝenerale ne estas tiom kritikinda, kiom la vesto, kaj ĉar mi ne estas recenzisto, mi ne volas kritiki la librojn el lingva vidpunkto. Multfoje mi tamen admiras la esperanto-verkistojn, ĉar ili kuraĝas daŭrigi sian verkadon, kvankam ili speras tiom da kritiko! Personoj mi ne malŝatas la kritikon, kiun oni direktas al verkistoj, kiuj uzas grandan nombron da nenecesaj neologismoj. Tute ne! Tia kritiko estas meritita, kaj ĝin ni ankaŭ direktu al certaj gazeteldonistoj. En ĉu gazeto mi trovis ne malpli ol 15 neologismojn en artikolo. Ĉu vi kredas, ke mi reabonis ĝin?

Koncerne la enhavon de niaj esperantolibroj, ĉu ne estas eble pli variigi la temojn? Ni multe agitas por logi kaj altiri la junularon al la esperantomovado, sed kion ni faras por krei interesan legadon al ĝi? La esperanta literaturo ja estas riĉa, sed la pli granda parto de ĝi traktas pri historiaj aferoj kaj tia legado ĝenerale ne plaĉas kaj legas niajn junulojn! Ne, se ni deziras vekti ilian legemon ni eldonu modernajn librojn, kiuj enhave pli similas la librojn, kiujn eldonas la naciaj eldonoj. Pro tio, ke la celo sanktigas la rimandojn, ni ne timu kelkfoje eldoni librojn de la tipo "kolera". Kompreneble ne estas nia intenco proponi, ke ni eldonu nur tiajn librojn. Sed ni ebligu al ĉiu legi tion, kion li aŭ ŝi deziras. Per la profito, kiun la eldonistoj faras, ili oferu certan kvanton de la kapitalo por eldoni librojn, kiuj kontentigas ankaŭ la aliajn kategoriojn de legantoj, t.e. la legantoj, kiuj jam kulturis sian guston! Verŝajne mia kritiketo ne plaĉas al eldonistoj, kiuj eventuale

legas ĝin. La eldonistoj prave opinias, ke estas facile proponi kaj konsili, sed ne estas tiel facile realigi la aferon. Mi ne estas blinda por ĉiuj malfacilaĵoj, kiujn ili devas venki, sed neniu povas forpreni de mi la kredon, ke estas eble kreskigi la legemon kaj tiamaniere altigi la certe tre necesan profiton de niaj estimataj eldonistoj, kiuj ĝis nun ne povis ŝovi monon. Neniu estus pli ĝoja ol mi, se niaj eldonoj donus profiton al siaj posedantoj. Des pli da libroj mi havus okazon legi!

En nro 4/1949 de "La Espero" nia samideano M. Markheden starigis la demandon ĉu ne estus konvene normigi la formatojn de esperantaj libroj kaj gazetoj? Kial ne presigi poŝlibrojn en la formato A6 (10,5 — 14,8 cm), ordinarajn librojn en la formato A5 (14,8 — 21 cm) kaj librojn, kiuj postulas pli grandan formaton, en A4 (21 — 29,7 cm)? Multaj esperantolibroj povas esti nur tre maldikaj. Se ili havus normigitan formaton, oni tamen povus kunbindi multajn tiajn, kaj tiel ricevi belajn librojn por la breto por la reklamo. Mi substrekas la vortojn de M. Markheden, ke ni esperantistoj, kiuj deziras ordon en la mondo, komencu ordigi niajn proprajn eldonaĵojn. Kaj antaŭ ĉio, ni ne forgesu pli belan veston al niaj libroj!

Literaturo

Alphonse Daudet: Leteroj el mia muelejo.
Trad. Mijake-Sihej. Prezo 0,40 US-dolaro.
Eld. Japana Esperanto-Instituto,
Hono-Motomati 1-13, Tokio.

Leteroj el mia muelejo estas laŭ mia koncepto pri literaturo la plej vivoproksima, neŝablona kaj senafekta libro en la tuta franca belliteraturo. La vortoj kaj frazoj, la figuroj kaj okazoj, ĉio kvazaŭ nur elfluas el la riĉa vivotuto same kiel la akvo en pura arbara fonto, kiel varmo, helo kaj verdaĵo en sunbrila somera pejzaĝo. Ĉio estas simpla en la plej bona kaj bela sencio de la vorto, tamen samtempe plena de la graveco de la vivo mem, foje en sia simpleco tiel subtila kaj subluma, kiel cetere estas nia vivo nur en la plej serenaj kaj vivosinceraj momentoj.

Tiu libro estas konata kaj certe ankaŭ legata ĉie en la mondo de homoj kun iom vasta intereso por literaturo. Sed mi supozas, ke al la pli vasta publiko en la pli multaj landoj ĝi estas nemulte ko-

nata. Kaj tamen kiu ajn homo certe povas legi ĝin, kaj same certe ĝi pliriĝigis lian spiritan vivon.

La supre menciita traduko ampleksas trionon de la libro, kaj ĝi estas la unua kajero en nova japana serio, "Internacia biblioteko". Mi ne trovis mension, ĉu oni intencas eldoni ankaŭ la du aliajn trionojn, sed mi forte esperas, ke oni faros, ĉuokaze tiujn rakontojn, kiuj ĝenerale estas plej interesaj. La papero en tiu ĉi kajero ne estas bona: Kiu konas la kvaliton de antaŭmilitaj japanaj libroj tamen komprenas, ke tio ne dependas de neglekto ĉe la eldonisto. Kaj kompare kun la enhavo la papero tamen, esence, estas apuda afero.

La traduko faras al mi tute saman impreson kiel la originalo — sperto tre malofta. Same kiel en la originalo mi ne demandas, kial estas tiel aŭ tiel skribite. Mi sentas nur tion, ke tiel devas esti kaj ne en alia maniero, foje miras kaj admiras, ke oni tiel simple kaj memkompreneble povas esprimi tiom multe. Franco aŭ ali-landa specialisto pri franca literaturo eble povus trovi mankojn, kiujn mi ne vidas, sed certe la rikolto estus malabunda.

Kelkaj atentigoj: aloo devus esti alo; almenaŭ pri birdo mi cetere preferus la vorton flugilo. — Mi ne scias, ĉu la franca ferme (en La steloj) efektive egalas al farmdomo (laŭ la difino de P.V.), sed eĉ se jes, la vorto bieno aŭ biendomo ŝajnas al mi pli bona. Ĉu la bieno estas luata aŭ ne estas tie ĉi tute flanka afero. Farmi kun la senco kulturi teron fariĝis preskaŭ ĝenerala. Ĉu nehaltigebla misuzo? — Galanto — galantulo aŭ alia konvena vorto. — Robojn, p. 46, l. 12, eble skribararo pro antaŭa plurala atributo; devas esti singularo kiel en la originalo. A la belle étoile estas en La steloj tradukita per "sub la belaj steloj", kio bone taŭgas tie, sed mi supozas, ke ordinare estas plej bone diri "sub la ĉielo", "en la naturo". — P. 6, l. 8-9: . . . nur vivas per la lumo — vivas nur per la lumo. — P. 2, l. 5: . . . en la meza koro de Provence — mi preferus: meze en la koro de Provence. Verŝajne troviĝas ankoraŭ iuj tiaj neĝustajtoj, sed ili ŝajnas al mi sensignifaj kompare al la traduko kiel tuto, tamen korektindaj je ev. noveladono. S.F.

Goethe: Faŭsto I, trad. N. Bartelmes, 2a revizita eldono, 190 p., tole bind.

Prezo 9,50 gm, 2,40 us.dol.

Max Butin: Komentario al Faŭsto I. 18 p., kart.

Prezo 1,20 gm, 0,30 us.dol.

Ambaŭ eldonis: Siegfried Ziegler Verlag,

Esperantofako, München-Pasing.

Reklamo sur la kovrilo de la supre menciita komentario diras, ke Faŭsto estas "majstre tradukita". En nacia lingvo tiu esprimo

signifas, ke la traduko egalas aŭ preskaŭ egalas al la originalo, ke neniu gravaj detaloj aŭ eĉ gravaj nuancoj en enhavo, stilo kaj poezia valoro estas perditaj.

"Vi formoj ŝancelemaj realvenas" — ŝancelema eble estas uzata anstataŭ ŝanceligema, tion mi ne scias, sed la schwankende Gestalten fariĝas iom petolaj. — "Montrintaj frue sin al vidmalklaro." — Ĉu vidmalklaro impresas egale al trübten Blick? — "Ĉu revas ĝin ankoraŭ konsentaro?" Tio estas la tuta frazo, kaj el la du antaŭaj mi ne vidas, kio estas "ĝin". La senco apenaŭ fariĝus klara, se ne helpus: "Fühl ich mein Herz noch jenem Wahn geneigt?" — "Ha, vin inspiras nebulaĵa maro"; tio estas la supre nomitaj formoj, sed la nebulaĵa maro estas en si mem neklara afero, kiu ne povas doni la bildon de "Wie ihr aus Dunst und Nebel um mich steigt;". — "Leviĝas karaĵ ombroj el la fendo;" — El kiu fendo? mi demandas sed ne trovas respondon. — "spiritara sfer" — efikas al mi, eble subjektive, kiel: Geist estas spirito, aro estas suffikso, kiu montras multecon. Geister do estas taŭge tradukebla per spiritaro kaj Geisterreich per "spiritara sfer". Ankaŭ vortoj kiel "balsajujo" kaj "tincuj" — la lasta por "Mottenwelt" — ŝajnas al mi ĝeni poezian impreson.

Kiam estas dirate pri la suno: "Kaj vojon, kiun ĝi bonkonas tondriras laŭ rutina sperto", tio ŝajnas pli familiara kaj brue, rutina ol la kvazaŭ destinofiksita kaj majesta "Und ihre vorge-schriebne Reise/Vollendet sic mit Donnergang". Kiam en la originalo la ŝtormoj muĝas kaj "bilden Wütend eine Kette der tiefsten Wirkung ringsumher", tiu "tiefsten Wirkung" povas soni iom patose al nuntempa orelo, sed la esperanta "de pleja efikeg' ĉenaron" impresas al mi kiel malbona teknika traduko.

La tradukinto ŝatas en sia poezia sintakso vortmikson, kiu ne konformas al la logika, al simpleco kaj klareco strebanta esperanto, kaj la simpla, klara formo de la originaj versoj ne donas moti- von por tiu tradukmaniero. Ekzemploj: En ĉiun li flajon nazon puŝas. — Vin kie kaptas mi, sen fin' natur'? — Peteg min via klinas teron. — Jes, viaj paroladoj, tiel pompaj/en kiuj vi absurdojn krispas homajn,/ aŭtuna kiel vent' sengustas trompaj/ blovanta sek- follojn senaromajn! — En homosorton min sen koro/ repuŝis en malcertan vi.

Ne pro malico mi faris la suprajn citaĵojn, nek kontraŭ la traduk- into nek kontraŭ la eldonejo, kies anoncesprimo certe estas atesto el iama recenzo. "Majstra traduko" estis kaj ankoraŭ grandparte estas la plej ĝenerala atesto pri esperantaj tradukoj. Sed nek la lingvo nek la movado nek iuj personoj efektive gajnas de tia valor- skalo. Se per majstra ni distingas tion, kion en nacia lingvo estus nur hezite aprobata — malgraŭ tio ke ankaŭ en naciaj lingvoj trovi- ĝas malbonaj tradukoj kaj ankaŭ malbonaj originaloj — ni per tio

nekonscie nur prezentas saliran komedion pri homa vanteco, inter fuŝe kaj sengluste pentritaj kulturkulisoj, kaj samtempe kaŭzas grandan malutilon kaj al nia afero kaj al ni mem.

Se mi de la prijuĝoj pri la donitaj citaĵoj forprenas tion, kio povas esti subjektivaj impresoj, gustoj kaj konceptoj, restas tamen liom da nekontentigaj detaloj, ke mi ne povas sincere nomi la tradukon majstra.

Tamen ĝi estas aprobinda, kaj tio ne estas malalta atesto pri laboro tiom malfacila kaj giganta. Estus tre maljuste juĝi la tuton laŭ miaj amasigitaj ekzemploj. Plej ofte la lingvo estas klara kaj plaĉa, kaj la fideleco al la originalo estas granda. Poeziaj kvalitoj kaj impresoforto estas ne fortaj sed laŭ mia sento vera rebrilo de la originalo. Mi sentas vivon en la lingvo kaj la homoj, kaj tion mi konsideras tre grava merito.

Traduko kiel tiu ĉi estas necesa por la evoluo kaj perfektigo de nia lingvo. De meritoj kaj de mankoj ni lernu. Se la lingvo kaj la kulturo de la esperantistoj iam estos pli riĉaj ol nun, tio estos nur dank' al kaj sur la fundamento de ĝisnunaj atingoj.

Tipografio kaj bindo estas bonaj.

Al legantoj fremdaj al Faŭsto kaj ĝia estiĝo la komentario de Butin donas valoran literaturhistorian resumon.

Ekster Germanujo Faŭsto estas akirebla nur de SAT, Parizo. La komentario kaj ĉiuj venontaj libroj de la eldonejo estos akireblaj de la eldonejo aŭ de landaj libroservoj. S. E.

ATENTIGO

Laŭ propono de SAT kaj interkonsente kun diversaj aliaj revuoj kaj gazetoj MR informas: "Konstatinte, ke tekstoj bonfide akceptitaj en niaj kolonoj, surprize aperis ankaŭ en aliaj esp.-gazetoj, ni decidis, ke, de nun, ni publikigos en nia gazeto nur la tekston, kies aŭtoro deklaras, ke li ne sendis la samon al aliaj gazetoj. — Komprenibile tiu rigora regulo ne koncernas la komunikojn de la instancoj komunaj al ĉiuj esperantistoj, ekz. la Akademio, nek la informojn, gravajn kaj urgajn, kiujn devas koni ĉiuj esperantistoj senescepte.

Ni esprimas bedaŭron, ke esperantaj gazetoj ĉerpas artikolojn el aliaj esperantaj gazetoj kaj ke esperantistoj publikigas artikolojn tradukitajn el aŭ en esperanton, petinte permeson nek al la aŭtoro nek al la redakcio. Ni ŝatus, ke tiu kutimo malaperus el Esperantujo."

KOREKTOJ. En nro 2/49: P. 1 en la rim. pri Ŝrnc: estis anst. estas. — P. 21, l. 12 de mals.: nobelulino — estu nobelino. Pro la eraro kulpas ne la verkinto sed la redaktoro. Nekonscie aŭ pro pensoglito mi faris la ŝanĝon kaj poste ne rimarkis en la presprovaĵo. — P. 23, lasta l.: antaŭajn tagojn — antaŭan tagon.